MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO 6

JUNIO 2022 Kol. 445/38

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo**: Membraj kunvenoj Kunveno en Danlando Verden kaj Amo-seminario en Greziljono Kronviruso Testudo Ŝerco El la redakcio

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## Membraj kunvenoj de AEH kaj EK

Por la 16-a de septembro 2022 ni planas havi membran kunvenon de AEH kaj de EK de Dr. Schulhof Pardubice.

Ni interkonsentis kun la Ĉeĥa Esperanta Asocio, ke ni organizos niajn kunvenojn en la sama loko en Pardubice, ĉar multaj homoj estas anoj kaj de AEH kaj de ĈEA, do la semajnfino, kiam okazos la ĈEA-konferenco, estos taŭga por ambaŭ organizoj.

red.

## Kunveno en Danlando

Inter la sabatoj la 30-a de julio kaj 6-a de aŭgusto 2022 la Esperanto-semajno en Klint okazos paralele kun dana, sveda, angla kaj germana kursoj en internacia etoso. Matene estos lingva instruado pri la internacia lingvo Esperanto, posttagmeze estos konversacia rondo. En vespero estos interpretata prelego aŭ distra programo, estos ankaŭ teo kaj kukoj en la restoracio Terrassen. Bonvenon al la Martinus-Centro, Klint.

Skribu al info@martinus.dk Ole Therkelsen

El la nova numero de eo-Kosmos

REVUO de MARTINUS-INSTITUTO, DANIO.

## Verden kaj AMO-SEMINARIO en Greziljono

La seminario okazis inter la 31-a de marto kaj la 5-a de aprilo 2022 en la Esperanto-kastelo Greziljono. Ĝi estis la dua kunsido post *Parma* en Italio. La seminarion partoprenis 20 geesperantistoj kaj kelkaj pliaj per interreto.

La projekto VERDEN estas subvenciata de Eŭropa Unio kaj kunordigata de Universala E-Asocio. En ĝi kunlaboras IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) kaj BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia), faka sekcio de TEJO (Tutmonda Esperanto-Junulara Organizo), kun la subteno de Parma Esperanto-Grupo kaj Flandra Esperanto-Ligo.



Temas pri internacia kunla-boro pri daŭripovo kaj transporto. Ĝi ricevas subvencion de la nederlanda Erasmus-agentejo. En la pro-jekto partoprenas la jenaj landoj: Belgio, Ĉeĥio, Francio, Italio, Nederlando. Francesco Maurelli, kunordigas la projek-ton nome de UEA.

La renkonton en Greziljono iniciatis la prezidantino de IFEF Rodica Todor. La seminarion malfermis Stefan MacGill. Sara Spanò kaj Francesko Maurelli konigis al ni la programon Erasmus kaj la projekton VERDEN. Poste sekvis pluraj prelegoj: Jaroslav Matuška el Ĉeĥio parolis pri fakultatoj kaj projektoj, la juna studento Matěj Berka pri siaj spertoj en la projekto, Christine Brücker pri la danĝeroj de varmiĝo kaj Lars Sözüer pri efiko de la trafiko al la klimato. Rodica Todor parolis pri la politiko de EU rilate al fervojo. Bert Schumann priskribis al ni la verdan vojon sur iama fervojo ĉe Greziljono. Ladislav Hakl legis prelegon de Ladislav Kovář pri eksteraj kaj internaj kondiĉoj por daŭripova fervojtransporto. Boris Michael Mandirola parolis pri "La Eŭropa Verda Pakto – daŭripova moviĝeblo". Franco Bressanin prezentis plurajn filmetojn pri agrikulturo, akvomastrumado, verdaj muroj kaj verdaĵoj eĉ en trajno-vagonoj. Vito Tornillo prezentis al ni la hibridajn trajnojn. Ambicia estas la projekto de Lars Sözüer pri retpaĝo por helpi al la planado de trajnaj vojaĝoj kun bicikloj.

Kadre de AMO 84 parolis Stefan MacGill pri fervojoj por daŭripovo. Laurent Vignaud instruis Esperanton al la juna Matěj, kiu tre entuziasme mem eklernis Esperanton antaŭ kvar monatoj.

Dum libera tempo la partoprenantoj promenis en la ĉirkaŭaĵo kaj vizitis la urbon *Baugé* kaj ankaŭ ĝian malnovan parton kun spiral-tordita turo. Malgraŭ la ŝanĝiĝema vetero ni pasigis agrablajn tagojn inter esperantistoj.

Bongusta manĝo kontribuis al la bona etoso. Bert Schumann tre bone prizorgis la ĉeestantojn.

*Liba Gabalda*

## Mia kronviruso kaj nia sanitaro

Kiam mi jam la kvaran tagon havis febron, supermezure ŝvitis, estis tre laca kaj kiam komencis dolori mia gorĝo, mi decidis iri al kuracisto. Ĉar mi ne estis irpova, eĉ ne kapablis veturi per buso, la edzino de mia nepo, Helena, forveturigis min tien per aŭtomobilo.
Ĉe la kuracisto dume okazis ŝanĝoj. La maljuna kuracisto kaj lia flegistino pensiiĝis kaj nun tie estas nova kuracistino kaj nova flegistino.

En la atendoĉambro estis multaj homoj. Sur la pordo al la flegistino haltigis min la papero, ke al la kuracistino oni necesas sin antaŭmendi. Mi ne estis antaŭanoncita, tamen mi frapetis sur la pordon. Kiam la flegistino eliris, mi informis ŝin pri mia stato. La flegistino antaŭe sakris al mi, ke mi ne antaŭmendis min, kaj poste eligis min por atendi en la koridoro, ĉar mi estas malsana. Ĉu tiuj homoj en la atendoĉambro kredeble estis sanaj? Post 20 minutoj da atendado akceptis min la kuracistino mem tra sia privata enirejo. Ŝi estis, kontraŭe al la flegistino, afabla. Ŝi finaŭskultis min, trarigardis min kaj diris, ke temas certe pri la kronviruso, kaj sendis min testiĝi.

La sekvan matenon mi telefonsciigu al ŝi la rezulton. Se mi estos pozitiva, mi sendu iun por kuraciloj. Ni do veturis tra duono de la urbo por testiĝi. Posttagmeze mi ricevis la mesaĝon, ke la rezulto de mia testo estas pozitiva.

Matene mi telefone sciigis tion al la kuracistino. Ŝi ĝojkriis, ke ŝi tion ekkonis, kaj diris, ke mi persone alveturu al ŝi, ĉar mi devos ion subskribi. Helena denove veturigis min al la kuracistino. Ĉi-foje la flegistino kun rideto atendis min, eĉ timigis min per tio. Ŝi direktis min al la kuracistino, denove tra la privata enirejo. Tie mi subskribis la paperon, ke mi akceptas tiun kuracilon, sed anstataŭ la kuraciloj ŝi puŝis en miajn manojn la recepton kaj forsendis min kun ĝi en la hospitalon en la infektan pavilonon.

Ĉar la hospitalo estas en mala fino de la urbo kaj eĉ estas tien sufiĉe granda ĉirkaŭvojo, mi ĝojis, ke mi veturas per la aŭtomobilo. Per aŭtobuso mi ne estus sukcesinta elteni tion. En la hospitalo mi fine ricevis medikamenton, eĉ kun instrukcio pri la uzado.

Malgraŭ ke mi estus devinta multe ripozi kaj resti en kvaranteno, laŭ la rekomendo de la kuracistino, mi devis sufiĉe multe vojaĝi. Kaj mi havas bonŝancon, ke mi havas familion, kiu zorgas pri mi. Se mi tion estus devinta traveturi per plenplenaj busoj, mi estus povinta infekti multajn samvojaĝanojn, kaj mi ne certas, ĉu mi tiun vojaĝadon sukcesus fari. Mi certas, ke ankaŭ mi infektiĝis ĉi-maniere.

Eva Pazourková

## Simpatia maljunulo

En januaro 2022 oni festis la naskiĝdaton de simpatia maljunulo — la plej maljuna surtera besto en la mondo, kiu kompletigis sian 190-an vivojaron. Temas pri Jonathan, maskla testudo el


specio deveninta el la Insuloj Seychelles. Fakte, tiu aĝo, kiun oni atribuas al ĝi, estas proksimuma, ĉar ne ekzistas dokumentoj pri ĝia preciza naskiĝdato. Ĝi vivas en ĝardenoj de oficiala rezidejo de la guberniestro de la Insulo Sankta Helena, izolita loko en la mezo de la Atlantika oceano, kiu apartenas al la Brita Imperio. (Cetere, la insulo fariĝis konata en la historio pro la fakto, ke tien oni ekzilis Napoleonon Bonaparton, kiu tie mortis, en 1821.)



Oni kalkulas, ke Jonathan estis pli-malpli 50-jara, kiam ĝi estis transportita en tiun insulon, en la jaro 1882. La plej malnova dokumento pri ĝia aĝo estas foto farita en 1886, sur kiu oni povas vidi ĝin, kune kun alia testudo, sur la herbejo de la guberniestra ĝardeno. Oni scias pri aliaj samspeciaj testudoj, kiuj atingis altan aĝon: unu vivis en Tongo, kaj mortis en 1966 (189-jara); alia vivis en zoologia ĝardeno en Kolkato kaj mortis

en 2006 (255-jara). Tamen, en ĉiuj kazoj, mankas precizaj dokumentoj.

Kiel ĉiu tre maljuna estulo, Jonathan havas sanproblemojn. Ĝi estas blinda (pro katarakto) kaj apenaŭ povas flari. Pro tio, ĝi estis malfortika kaj malvigla, ĉar ĝi ne sukcesis bone nutriĝi. Lastatempe, zorganto helpas ĝin faciligante englutadon de pomoj, karotoj, bananoj kaj aliaj fruktoj, kaj de tio rezultas reviglîĝo kaj resaniĝo, laŭ takso de bestkuracisto.



Tiuj testudoj estas nomataj "Gigantaj Testudoj el Aldabro", ĉar ili postvivas en la insularo Aldabro, kiu estas parto de Seychelles, en la Hinda Oceano. Ili estas la duaj plej grandaj surteraj testudoj (nur la testudoj el Galapagoj, en Ekvadoro, estas pli grandaj). La karapacoj de maskloj povas atingi 1,40

metron en longo, kaj 160 kilogramojn en pezo. Ili suferis amasan mortigadon en la 19-a jarcento, kiam maristoj ilin ĉasis por manĝado, sed nuntempe, post strategia agado, ili estas protektataj en la tiel nomata "Paradizo de Testudoj", monda riĉaĵo laŭ klasifiko de Unesko. Tie vivas miloj da individuoj, en la naturo. Ili havas mildan temperamenton kaj facile akceptas kunvivadon kun homoj. El la Esperanta Retradio

Tiun ĉi artikolon verkis kaj produktis Paŭlo S. Viana el Brazilo

**Ŝerco el la libro de Michal Lebl:**

Kvinjara Joĉjo venas en bufedon kaj diras:
„Unu bieron!""
„Kaj ĉu vi ne preferus havi sukon?"
Mi preferus, sed al mi mankas 5 kronoj."

El la redakcio:

Per interreto deziras korespondadi 43 j. sciencisto el Srilanko, esperantisto handikapita post vakcina poliomjelito, interesas lin muziko kaj lingvolernado. Lia adreso estas en nia redakcio.


**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537 970**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola.   Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.